



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 156

Aprilo, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆ ☆

MENSA LUDO POR *LA MI-KLONO*

Ekstrakto el neeldonita romano, *La Mi-klono*, kopirajtita 1997 de Gene Keyes. La angla versio de la ekstrakto gajnis duan premion de la Falko III Kunveno, Halifaxo, Novembro 1997.

Ni eniras la rakonton ĉe ĉapitro 2, "La Procedo". Antaŭ du semajnoj Donaldso Nordo, nevaste konata profesoro parttempa de historio, ĉeestis feston de D-ro Petro Meknaŭtan, samklasano de la Universitato de Harvardo kaj famulo de bio-teknologio. Supozante ke Meknaŭtan ŝercas kun li, Don donis pecon de apudunga haŭto al la doktoro por 'fari klonon'. Don hezite daŭrigas la ŝercon kiam Meknaŭtan alvokas lin al sia oficejo, kaj petas ke Don kunprenu kroman kompletan da vestoj. Kiam Don eniris la oficejon, Petro leviĝis post sia skribotablo. Sen paŭzo por salut-babileto, li simple diris, "Via klono disvolviĝas tre bone. Mi nun devas bazlinie agordi la cerbajn funkciojn por sinkronigi kun la korpo antaŭ ol ni vekas ĝin." Petro muntis paron de malgrandaj pladoantenoj por kapti kaj transmeti la cerbo-ondojn de Don al la klono per komputora disko.

"Kie estas la klono?" demandis Don.

"Ĝi — mi intencas diri, li — estas ankoraŭ en la cisterno ĉe la labo."

"Kaj kiel ĝi — li — alvenos ĉi tien?"

"Nenia problemo. Mi havas kamioneton. Sed tio estos morgaŭ. Ni havas alian laboron por fari nun. Ĉu ni komencu?"

"Ni povus."

"Nu do, aŭskultu atente. Mi aranĝis ian etan formalan proceduron ĉi tie. Ni devas esti treege certe ke ni konsternetu nek la klonon, nek vin, fakte. Do, ni procedos laŭ etapoj, jene: "Unu!"

Petro etendigis siajn manojn antaŭ si por nombri fingrojn, kaj donis al sia dekstra polekso solidan frapon.

"Vi senvestigos vin kaj surmetos tiun robon.

"Du!"

Li levis kaj martelis sian dekstran montrofingron.

"Vi metos viajn okulvitrojn kaj vestojn sur tiu kafa tablo apud la sofo.

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

“Tri! Nu, jen la grava parto; atentu zorge.”

Petro tiris sian trian fingron malantaŭen kiel katapulto.

“Vi ne volas hipnotigan sugeston, tial vi devas fari etan sinsugeston por antaŭenigi la aferon. Tuj kiam vi kuŝos sur la sofo, mi volas ke vi komencu pensi ion kiel ĉi tiun citaĵon: ‘Mi estas la klono de Don, kaj li postlasis ĉi tie por mi ĉi tiujn vestojn kaj miajn okulvitrojn.’ Fino de la citaĵo. Ĉu trafe?”

Don hezitis. “Iom.”

“Mi dubas tion. Vi aspektas konfuzita. Jen. Pensu ĉi tiel. Morgaŭ matene mi rulos la klonon ĉi tien. Li portos hospitalan robon ekzakte kiel tiun kiun vi baldaŭ portos. Li vekiĝos sur tiu sama sofo. La sama muziko ludos el la radio. Je tiu momento, li havos ekzakte la samajn pensojn en sia kapo kiujn vi havos nun kiam ni trairas ĉi tiun ekzercon — por diri nenion pri la fakto ke li havos korpon, cerbon, kaj tutecon da memoroj kiuj estas i-den-taj al la vi-aj.” La finajn sep silabojn Petro substrekis svingante sian montrofingron reciproke inter Don kaj la sofo.

“Mmm.” Don ŝajnis esti iomete ekster kompreno.

“Vi estas ankoraŭ konfuzita. Ni revenos al tio post momento. Intertempe:

“Kvar!”

Sekvanta fingro.

“Post mi donos al vi la signon ke ni finis, tiam vi povos surporti la ekstrajn vestojn kaj okulvitrojn kiujn vi havas en via valizo en la vestoŝranko. Lasu tiujn kiujn vi kunportis hodiaŭ ĝuste tie sur la kafa tablo. Nepre ne tuŝu ilin!”

Li paŭzis. Don diris nenion.

“Nun, revenante al tri. Dum vi estos kuŝanta sur la sofo, vi devos pensadi reve al vi mem, ‘Mi estas la klono de Don, kaj tuj kiam mi stariĝas, mi surmetos ĉi tiujn vestojn de mi kaj parolos al Doktoro Meknaŭtan.’”

“Do, iom — jes, sed pro kio?”

“Rigardu. Tiu klono estos vi, ĝuste ĝis la ĉarpio en la umbiliko, kaj ĝuste ĝis tiuj tiklantaj duboj en via menso. Do, kiam la klono vekiĝos, li ne kredos ke li estas klono. Li supozos ke li estas vi. Tial, ni — tio estas, vi kaj mi — devos planti almenaŭ kvazaŭan mesaĝon en lian menson, iel ke li estas ne nur Donaldo Nordo, sed ke li ankaŭ estas Donaldo Nordo, Klono. Aŭ Donaldo Nordo Du. Aŭ io. La kialo estas,” Petro mallaŭtigis sian voĉon kaj parolis malrapide por emfazo:

“Ni ne volas ke li panikiĝu kiam morgaŭ vi marŝos en mian oficejon.” Petro rekomencis sian normalan rapidpafan elparoladon: “Kaj ni ankaŭ ne volas ke vi svenu. Ĉar kvankam li scias ke vi — ke li — estus ĝoja havi klonon, lia menso krevos, kaj via menso ankaŭ, kiam li unue ekrimarkos vin. Li ne kredos ĝin, neniom pli ol vi kredos komence. Kaj inverse.”

“Povas esti.” La lakona respondo de Don sonis pensema sed ne tro persvadita. Petro pludiris: “Sed aliflanke, precize ĉi tiu konversacio estos jam parto de lia mensa estaĵo. Li jam scias kion antaŭvidi. Ĝis ioma grado.”

“Hm.”

“Li scias kion antaŭvidi — sed. Estos 18-hora breĉo post kiam vi eliros mian oficejon ĉi posttagmezon — je nur kelkaj pliaj minutoj.” Petro ekrigardis malpacience sian brakhorloĝon. “Nun estas la 3.45 horo ptm. Ni diru ke vi revenu morgaŭ je tagmezo. Via klono havos nek la memoron nek la scion de vi surmetante la aliajn vestojn, irante hejmen, prenante vespermanĝon, legante la tagĵurnalon, rigardante televidon, kion ajn. Kiam via klono vekiĝos je la deka horo morgaŭ matene, ankoraŭ ŝajnos al li kvazaŭ estus ĉirkaŭ la 4.00a ptm hodiaŭ.”

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

“Tago mankos.”

“Vi trafas! Sed li havos la konscion ke vi estas venonta por renkonti lin en mia oficejo je tagmezo.”

“Do, kial vi ne lasu lin vekigi je la kvara horo morgaŭ posttagmeze, kaj ni prokrastu tiun rendezuon ĝis tiam?”

“Ne, tio farus la konfuzon eĉ pli malbone. Ni ja bezonas iomete da konscia disonanco kiel sekurec-faktoro. Alie, la efiko estus ke la klono vekigas — tuta tago ekmalaperis — kaj tie vi estas tiam por renkonti lin. Ŝajnus kiel vekigante en anstataŭ el inkubsonĝon. Mi eĉ ne ŝatas ĉi tiun 18-horan atendadon, sed oni ne povas eviti tion. Ju pli baldaŭ, des pli bone. La komputoro-procedo havas la vekadon programitan por la deka horo morgaŭ matene. Post tiam mi bezonas proksimume horon aŭ iomete pli por ekzameni kaj pridemandi la klonon, kaj fortikigi lin por la renkontiĝo kun vi.”

“Nur unu horon?? Por ĉiom da tio??”

“Nenia kialo por tro treni la tutan aferon.”

“Kion vi signifas je 'konscia disonanco kiel sekurec-faktoro'?”

“Se la klono estas tiom skeptika kiel vi, li ne kredos ke li ne estas Donaldo Nordo la Originalo. Li pensos ke mi blagas al li.”

“Nu do, kial li pensus ion tian!” Don deklaris bonhumore.

“Ja faras vi; ja farus li. Li pensos ke estas la 4.00 ptm hodiaŭ, vendredo, kaj ne la 10.00 atm morgaŭ, sabato. Mi devos klopodi por pruvi al li ke vere estas sabato la 16-a de aprilo, kaj ke intertempe mi ne ŝteldonis drogaĉon al li. La diferenco inter mateno kaj posttagmezo — tio estas, la konscia disonanco — helpas konfirmi aferojn kaj helpas lin kompreni ke li estas Donaldo Nordo, kaj iom pli.”

“Se ĉio kion vi diras estas vera, kiel li, aŭ mi, scios kiu vere estas la klono, ne gravas kiam la horo?”

“Haha!” Petro ekdonis eksplodeman ekridon. “Ni transiros tiun ponton kiam ni atingos ĝin!”

“Se ni atingos ĝin,” Don grumblis, rekaptante sian malfidemon.

“Kredu,” diris Petro kun mokmalica sincereco.

Korekto

Lastan monaton mi eraris pri la titolo kiam mi transskribis raporton el Radio Polonia pri esperant-lingva filmo kiun oni promesis montri dum la marta Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco. La ĝusta nomo de la filmo estas “Incubus” (en la esperanta, “Inkubo”). Laŭ la retpaĝo* dediĉita al la filmo, “Inkubo” estis la unua usona kineja filmo kiu uzis nur Esperanton (kun anglalingvaj subtitoloj). Farita en 1965, tiu timiganta usona belarta filmo, aŭdaca, eksperimenta kaj mistika, temas pri la fantazia ventoblovata loko ‘Nomen Tuum’, tra kiu solene paŝas belaj demonoj kiuj serĉas purajn animojn por detrui ilin. La karakteroj Inkubo kaj Sukubo, perfektaj emblemoj de neesprimebla malbono, de nerezisteblaj estaĵoj kiuj trudas siajn povojn sur la homaro, estas supernaciaj. Pro tiu kialo oni serĉis sennacian lingvon kaj finfine elektis Esperanton, la plej fortikan el ĉiuj artefaritaj lingvoj, por ŝajnigi la lingvaĵon de la demonoj. La filmo verŝajne ne taŭgas por ĉiu gusto, kaj eble estas strange por fanfaroni ĝin. Tamen, ĉefrolulo William Shatner (plibone konata en televido kaj la kino kiel kapitano James T. Kirk) estas sufiĉe bone konata aktoro por veki la scivolon de multaj homoj pri la filmo, kaj pri Esperanto.




— La redaktoro

* www.incubusthefilm.com

GRATULOJN AL RADIO POLONIO!

Ekde la lastaj tagoj de marto Radio Polonia ĉiutage disaŭdigas 29 minutan programon — tiun, kiun oni povas aŭdi per la komputora inter-reto — anstataŭ la ĝis-tiama kvar-minuta raporto. Aldone al la kutima raporto pri aktualaĵoj, oni povas ĝui diversmanierajn prezentaĵojn, intervjuojn, leterkestojn, muzikon kaj eĉ la reaŭdigon de programeroj el al kvardekjara historio de la esperantaj elsendoj de Radio Polonia. Dum preskaŭ duonhoru oni plibone alkiutimiĝas al, kaj iom lernas pri la prezentistoj. Eĉ se la programo estas surbendigita la pasintan tagon, kaj oni de tempo al tempo parolas iom rapide, oni multe profitas aŭskultante bone elparolitan Esperanton kaj oni povas multon lerni pri Pollando, kaj ankaŭ pri Esperantio. Kiel kutime, la ret-adreso estas www.wrn.org/ondemand/. Brave al Radio Polonia kaj la Esperanto-redakcio!

— Bob Williamson



Kosovo

Kion vi opinias pri la bedaŭrinda konflikto en Serbio kaj ĝia provinco Kosovo? Ĉu la serboj ne estas frenezaj por daŭre trakti barbare kaj kruise la alban-devenajn kosovanojn? Ĉu NATO ne kulpas de absurda, eĉ krimula, pensmaniero kredi ke paco sekvos militan perforton? Kion vi opinias?

— La redakcio

